

Gratulmesa?oj okaze de la elekti?o de Alberto Fernández kiel prezidento de Argentino.



Varias, 28 okt (RHK) La prezidento de Kubo, Venezuelo, Meksiko, Bolivio kaj El Salvadoro estis inter la unuaj kiuj gratulis Alberto Fernández okaze de lia venko en la elektoj okazintaj ?i-diman?e en Argentino.

La prezidento Díaz-Canel sendis mesa?on pere de Twitter esprimante, ke “la granda patrolando festas”.

Siaflanke, Nicolás Maduro gratulis la paron Alberto kaj Cristina pro “ilia solida kaj nekontestebla venko en la unua rondo de prezidentaj elektoj”.

La “amasa ?eesto en la elektado... sendas klaran mesa?on de la argentina popolo kontra? la altrudo de krimaj novliberismaj politikoj ekonomiaj de la internacia mondfonduso (FMI) altruditaj senkompatate de la a?toritatuloj dum la lastaj jaroj”, emfazis Maduro.

Aliflanke, la meksika prezidento Andrés Manuel López Obrador (AMLO) esprimis sian “?ojon pro la efektivi?o de ekzemplodona kaj paca elekta tago, kiu esprimis la demokratian maturi?on de la popolo argentina”.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/206056-gratulmesagoj-okaze-de-la-elektigo-de-alberto-fernandez-kiel-prezidento-de-argentino>



Radio Habana Cuba